



OOMOTO

INTERNACIA

Monata organo de la UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

Telefona { PASSY 45-87
KLEBER 08-00

Sidejo : 124, rue de la Pompe, PARIS (16°)

Telegrafa adreso :
EUROPOMOTO-PARIS

Ĉio estas farebla,
kiam oni turnas eks-
kluzive al ĝi ĉiujn fort-
ojn. Neniel, tamen,
ŝanĝiĝas argilo en oron.

ONISABRO DEGUĈI.

Jarabono por ĉiuj landoj : 3 sv. fr.
Abonantoj dezirantaj membrokarton ricevas tian senpaga.

Ĉefredaktoro : K. NIŜIMURA

Helpredaktoro : H. OTAKA
Generala Sekretario : V. M. ŜIŜKOV

☆ Poŝtmandatoj devas esti sendataj al la persona nomo de la ĉefredaktoro. ☆

Ĉu Bernard Shaw estas Oomoto'ano?

Kiu ne konus la nomon de la genia angla verkisto? Dekano en la moderna literaturo, li estas unu el la plej famaj teatraj-aŭtoroj de la tutmondo. Ĉu li estas Oomoto'ano? La demando povas ŝajni stranga, tamen, ni povas respondi al ĝi per kelkaj konsideroj, kiuj sekvas.

La verkoj de B. Shaw estas multnombraj. Lia antaŭlasta teatraĵo estis prezentita en Londono dum tri vesperoj sinsekve, tiom ĝi estas longa. La titolo de tiu ĉi dramo estas: « Back to Matusalem » (Reveno al Matusalemo). La celo de tiu ĉi teatraĵo estas pruvi, ke la homa vivo devus esti plilongigata, se la civilizacio estus savinda. Ni ne deziras analizi tie ĉi la gigantan verkon de B. Shaw, sed ni kontentigaŝ doni kelkajn fragmentojn, kiujn ni tradukis de la angla originalo. Post tiuj ĉi fragmentoj ni penos respondi al la ĉi supra demando!

« Se homo timus Dion, oni povus trovi komunan bazon kaj eviti tion, kion Dio malaprobas. Eŭropo povus esti savata. Sed la nuna anarĥio estas pereco por nia civilizacio... La ekstrema milito estas nia bankroto!

« Homoj komencas serĉi religion.

La tuta celo de tiu ĉi libro estas montri al ili, kie serĉi ĝin.

« Ni ne bezonas novan religion, sed ni devas redistili la spiriton de la diversaj religioj...

« Ni perdis la kapablecon kompreni metafizikan verecon. Niaj ŝtatisoj devas adopti novan religion, kapablan esti vulgarigita. Civilizacio postmilita ne povas esti revigigata pere de arta spirado...

« La vera klasbatalo intelekta kaj ĝia celo estas la konkero de la animoj de infanoj. »

B. Shaw montras la fiaskon de la tradiciaj religioj dirante: « La sento kontraŭ la Biblio fariĝis tiom akra, ke la intelektuloj ne plu volas legi ĝin. » Li proponas novan sintezon de religioj, en kiu la Oriento estu reprezentata. (« Hinuĵo miksu siajn saĝulojn kun tiuj de Hispanujo. »)



Lastaŭ antaŭon Tao-Juan-representantoj vizitis Oomoto-Centron en Kameoka.
En la mezo staras Gesinjoroj Deguĉi.

Vidu artikolon « Tao-Juan kaj Oomoto » en la 36-a (decembro) numero.

B. Shaw kredas, ke la nova religio devas lerni de la scienco, ĉar dume homoj ne atentis al spiritualismo, ili blinde kredas matematikon kaj ŝizikon.

La vera religio de la 20-a jarcento estas do la *krea evoluo* kaj ĝi devas populariĝi, akirante legendojn, tradiciojn kaj proprajn art-kaj esprimformojn.

« Ni sopiras mondon de profetoj », ekkrias la profunde pensanta angla verkisto kaj li aldonas:

« Mi ĉiam scias, ke civilizacio bezonas religion por povi vivi kaj por ne morti! »

B. Shaw aŭtonas ankoraŭ: « ... ĉar ni estas en la enkonduko » — ke lia teatraĵo estas enkonduko al Biblio de la Krea Evoluo.

Tiu, kiu konas la principojn de Oomoto kaj atente legas la ĉi suprajn citaĵojn, konstatos kun ni, ke la granda aŭtoro de Anglujo divenis, ke religio, populara kaj nova, sintezo spiritualisma, sola kapablas savi la baraktantan civilizacion. La « Spirito de la Tempo » blovas en B. Shaw ankaŭ. Oomoto estas mem nenio alia ol la esprimo de la granda *Volo*, la sama, kiu konvinkis al spiritualismo unu el la plej materialistaj okcidentaj verkistoj. En tiu ĉi senco ni rajtas diri, ke B. Shaw estas Oomoto'ano — kaj

ne gravas, se li tion ne scias. Per lia influo la volo de la Krea Evoluo efektiviĝas. Lia aŭtoritata voĉo atingas milionojn da legantoj kaj konvinkas al spiritualismo centmilojn, kiuj ne ankoraŭ aŭdis pri Oomoto.

Kaj B. Shaw ne estas la sola el la granduloj, kiuj servas Oomoto'n senkonscie. Oni povas diri, ke la plej grandaj nomoj de la moderna literaturo, filozofio kaj scienco estas inspirataj de similaj sentoj. Tio donu al ni kuragojn por la Nova Jaro kaj ĉiu soldato de la Spiritualismo alportu sian brikon al la Domo de Homamo, en kiu materialigoŝ la spirito predikata.

MIGRANTO.

FARIĜI abonanto de
Oomoto Internacia
estas subteni la
Esperantisman!

La **Universala Homama Asocio**
estas la plej arda defendanto de **Esperanto**

Jarabono por ĉiuj landoj : 3 sv. fr. aŭ 15 fr. fr.
kun senpaga U. H. A.-membrokarto.

Ĉiu abonanto ricevas premion de
10 belaj Oomoto-ilustritaj poŝtkartoj
(Japanaj vindaĵoj.)

Abonu kaj abonigu ĉe **S-ro K. NIŜIMURA**
124, rue de la Pompe, Paris 16°

La nomo de nia ĵurnalo
ne estas "OOMOTO", sed
"OOMOTO INTERNACIA"

La Domo de Homamo estu verko de la Tutmonda Esperantistaro!

Depost aŭgusto 1929 ni ĉiunonate alvokas en nia ĵurnalo la helpon de ĉiuj gesamideanoj por la Domo de Homamo. La Esperanto-ĵurnaloj kiel *Esperanto*, *Genevo*; *Heroldo de Esperanto*, *Kolonjo*; *La Movado*, *Parizo*, k. a. bonvolis publikigi artikolojn pri ĝi. Kelkaj Gesamideanoj jam donacis sian brikon al la sankta afero, sed la entrepreno, estante grandioza, postulas nature la subtenon de de la Tutmonda Esperantistaro, sen kio ĝia realigo estus tute neimagebla.

La Domo de Homamo ne estos nur por ni, kiel ni jam sufiĉe klare priskribis tion en la antaŭaj numeroj de O. I., sed ĝi estos la centra domo, kie ĉiuj religiaj povos kunveni, ĉar la Centra Dio estos sanktigita kaj tie oni parolos kaj predikos nur pri Amo kaj Homaranismo, kaj ne pri dogmoj de diversaj sektoj.

Ĉirkaŭ la Centra Domo troviĝos biblioteko kun Esperanto-fako, muzeo, klubo, loĝejoj ktp. La teritorio estos sufiĉe vasta kaj multaj esperantistoj povos konstrui siajn proprajn domojn kaj fari Esperanto-kolonion. Alivorte, la loko estos Esperantujo, kiun niaj antaŭirintoj longe sopiris, sed ne realigis. Kaj nia sintendo al la Domo estos simple neŭtrala, pri tio ni ja klarigis en nia januara numero de O. I. Administran regularon ni starigos pere de elektita komitato, kiun ni volas fondi, kiam ni ricevos monon egalan al 1000 anglaj pundoj.

Do, la afero estas komuna kaj tute esperantista. Ni estas la proponantoj — la iniciatantoj, kaj en nia laboro ni ne malkuraĝiĝos, ni sekvos la vojon ĝis nia plano efektiviĝos. Kaj por tiu ĉi efektiviĝo

estas necesa la fervora helpo de niaj gesamideanoj, kiujn ni sincere petas al ago por la komuna entrepreno.

D-ro Zamenhof, je la komenco de sia sistema teorie reforma laboro por Esperanto, deklaris:

«... Mi jam nun komencas preparajn paŝojn por la ekkreado de sistema literaturo, kaj por energia helpo en tiu ĉi prepariĝo, mi nun alvokas ĉiujn amikojn de la lingvo Esperanto. Mi petas ilin forĵeti sian dormadon, sian paralizigan «oni faros sen mi», mi petas, ke ĉiu alportu sian briketon al nia konstruo. El gutoj fariĝas maro; sed se ĉiu konservos sian guton en sia poŝo, dirante la maro fariĝos ankaŭ sen mia guto, — tiam nenio estos eble fari.»

Pri la Domo de Homamo ni ankaŭ volas diri la samon kaj ni ne ĉesos alvoki la helpon donaci briketon kaj guton de ĉiuj esperantistoj en la mondo por kompletigi la konstruon: kaj fari la maron.

Ne estas necese aldoni, ke la proponantoj estas japanoj, ĉar ili estas tute neŭtralaj tie ĉi en Eŭropo, kaj ili pli juste povas agi rilate al la aliaj.

Ĉiuj gesamideanoj povas meti sur nin tutan fidon kaj prosperigi la aferon.

K. NIŠIMURA.

AKVA SPEGULO

ONISABRO, DEGUĈI

Servo por Mortintoj

La volo kaj nocio de la surteraj homoj komunikigas al ĉielregno. Se la postevivantoj (idoj) sin ekzercas en Diokredo, tio certe bone influas al la pragepatroj troviĝantaj en la spirita mondo; nome, iliĵ volo kaj nocio ankaŭ

pli kaj pli progresas dank'al la virto de la pia kredo de la posteuloj. Same kun tio, estas tre grave fari diservojn por la spirito de mortintoj. Ne gravas procedo: ĉu pere de pastraj manoj, aŭ per Budhistaj manieroj. Ĉiu servo tamen komunikigas sendifere al la spirito, ĉar la volo de la posteuloj, kiuj okazigas diservon, direkte celas ilin. Fari diservojn por la prapatraj spiritoj estas ĝuste kiel sendi mandaton al la ĉielregno.

Revoki Sunon

Ĉio en la universo iras nur evoluan vojon respektive kaj neniam retririgas, nek estas reŝebla.

Rigardu! floroj sin ne reŝefrigas denove, eĉ se ili malsukcesas flori. Dume, la homoj faras ofte refaron, nuliginte la unuan rezultaton: ree fari laboritan, sed ne plaĉatan aferon, ree skribi iom fuŝitan skribaĵon, ktp. Ĉu ne, tiamaniere, la tempo bezonita por la unua fojo estas tute vane perdita? Tio egalas revoki (aŭ relevi) la sunon, kio ja estas granda spitaĵo de la natura leĝo.

Mi faras neniam refaradon, ĉu skribante aŭ desegnante, ĉu verkante aŭ manlaborante (1). Ne ekzistas sukceso en la afero, kiun oni laboras spite de la marŝado de la universo.

Dombestoj kaj homa salivo

Homa salivo donas nenian influon al dombestoj, sed ĝi estas tre venena por sovaĝaj bestoj aŭ insektoj. Pro tio ili tre timas ĝin. Se la homo surŝutus la salivon sur miriapodon (cent-pieda ramp-insekto), ĝi subite alikoloriĝas kaj malfortiĝas. Oni ofte vides, ke la homo nutras junajn hundojn aŭ katojn per

(1) Majstro O. Deguĉi faras tre ofte ceramikaĵojn kun tre alta artvaloru, je kiuj specialistoj sin surprizas.

Bataloj en Dia Mondo

(de Majstro O. DEGUĈI)

ĈAPITRO XXXIII

de la *Rakontoj el la Spirita Mondo*

Tri Perloj

Ojasima-Hiko-no-Mikoto estis savita sur la sankta monto kaj tie li ankaŭ ricevis altvaloran perlon, nomitan *Masumi* de *Konohana-Hime-no-Mikoto*, kiu venis malsupren de la ĉielo ĝuste pro tio. *Ojasima-Hiko* longe rigardis la belegan novan maron, kiu etendis sian surfacon antaŭ li. Kiel ni scias, la monto *Tempo* subite malaperis kaj la nuna Japana Maro prenis ĝian lokon. La perlo de *Siomicu* (alflujo) kaj *Siohiru* (defluo) estis malaperintaj en la ondegjoj de la oceano. Same estis *Inajama-Hiko* kaj la ceteraj malicaĵaj dioj.

Inajama-Hiko sin ŝanĝis subite en malican drakon kaj traserĉis la maron en ĉiuj direktoj, esperante trovi la perdiĝintajn perlojn. *Ojasima-Hiko-no-Mikoto* rimarkis tion, rigardante de supre la monto tre alta. Li do prenis kvar ŝtonojn, kiuj kuŝis apud li sur la tero kaj faris al ili sanktan metodon de enblovo. Tio estas, li jektis la kvar ŝtonojn samtempe al la direkto de la malica drakdio. Ektimigante, la malica drako tuj sin kaŝis en la fundo de la maro. La kvar ŝtonoj, kiuj falis en la oceanon fariĝis kvar insuloj: *Sado*, *Iki* kaj *Cusima* (kiu lasta konsistas siaflanke el du insuloj).

Nun *Otoĵone-Hime-no-Mikoto* alkuris, venante de la Drakpalaco. Ĝi estis sin ŝanĝinta en formon de granda drako kaj sia intenco estis ankaŭ trovi la altvalorajn perlojn en la oceano. Sed *Inajama-Hiko*, vidante la alvenon de konkuranto, kontraŭbatalis sin kaj oni havis la spektaklon de du drakoj interbatalantaj en la mezo de la Oceano.

Post eligo de grandaj bruoj kaj fardo de gigantaj ondoj, *Otoĵone-Hime-no-Mikoto* venkis kaj si gajnis la du perlojn. *Otoĵone* fariĝis tiutempe nub-drako. Eligante orajn radiojn el sia korpo, si forkuris al la direkto de la monto *Kiuĝan*. La granda drako atingis la pinton de la monto kaj tie si subite ŝanĝiĝis en solene belan kaj noblan diion kaj si gentile oferis la du perlojn al *Konohana-Hime-no-Mikoto*. Tiu ĉi diino multe aprobis la meriton de *Otoĵone* kaj pardonis ŝiajn ĝisnunajn pekojn. Kaj *Otoĵone* estis tiutempe nomita: gardo-dio de la lando de la leviganta Suno. Ĝi estas destinita edziniĝi al la Dio *Hinode* (= Sun-Leviganta).

Konohana-Hime-no-Mikoto donis al *Ojasima-Hiko-no-Mikoto* la sekvantan ordonon: «Vi ĵus ricevis de la ĉielo perlon de *Masumi* kaj nun mi donos al vi du pluajn perlojn: tiun de *Siomicu* kaj tiun de *Siohiru*, kiuj estis savitaj el la maro. Via sankta tasko estu la firmigo kaj la evoluigo de la Universo pere de la potenco de tiuj ĉi tri perloj.» Jen estas la treege grava deklaro de Dio.

Ricevinte tiujn ĉi tri perlojn, la diaj fortoj de *Ojasima-Hiko* estis multobligitaj. Liaj fortoj kaj famo disŝanĝis tra la mondo kaj li estis nomata «la granda Dio de tri Spiritoj» (*Mizu-no-Mitama*).

ĈAPITRO XXXII

Brulego de l'Edeno

Ĝojigita per la ricevo de tri altvaloraj perloj, *Ojasima-Hiko-no-Mikoto* revenis al la drakpalaco. Li faris tiun ĉi vojaĝon en aersippo, donacita al li de *Konohana-Hime*. Li tiamaniere forflugis al la okcidenta direkto.

Dum tiu ĉi tempo kunvenis en la ĝardeno de l'Edeno la sekvantaj malicaĵaj spiritoj: *Takekuma*, *Kosumi-Hime* kaj *Aŝinaga-Hiko*. Ili estis informataj laŭ raporto de *Murakumo-Uake*, ke *Ojasima-Hiko-no-Mikoto* estas revenanta sendanĝere al la Drakpalaco. Tiu ĉi novaĵo kompreneble konsternis la malicajn konspirantojn. Ili do interkonsiliĝis pri nova plano kontraŭ la Dia Mondo. *Kosumi-Hime*

kaj *Aŝinaga-Hiko*, ŝajnigante penton, iris al la Drakpalaco kaj tie ili hipokrite gratulis *Ojasima-Hiko-no-Mikoto*'n okaze de lia reveno en la Palacon. Ili eĉ invitis lin al festmanĝo en la Ĝardeno de l'Edeno. Ĉar *Ojasima-Hiko* estas denature bonintenca Dio, plena de amo kaj havanta sinceran koron, li nenion suspektis kaj akceptis la malican inviton. Li tuj sekvis la delegitojn kaj tute naive iris kun ili al la Ĝardeno de l'Edeno. Li estis tuj gvidata en la plej profundan parton de la Edena Palaco kaj tie li estis petata sidiĝi, al kio li ankaŭ konsentis. *Ojasima-Hiko-no-Mikoto* estas akompanata de siaj suboficioj: *Moritaka-Hiko*, *Morijasu-Hiko* kaj *Takami-Hime*.

Kosumi-Hime kaj *Aŝinaga-Hiko* hipokrite elmontris sian fidelecon al *Ojasima-Hiko*, ili ĉion faris por lin ĝojigaj kaj kaj kontentigaj. La naiva *Ojasima-Hiko-no-Mikoto* baldaŭ ebruiĝis kaj esprimis la deziron pasigi la nokton en la Edeno Palaco. Li ja estas tiel senzorgema!

Takekuma atente atendis, kiam *Mikoto* profunde endormiĝis kaj li kaptis la plej oportunan momenton por la realigo de sia malica plano. Li tiam ekrbuligis la Palacon de ĉiuj flankoj, tiamaniere, volante mortigi *Ojasima-Hiko*'n kun liaj sekvantoj. Ĉiuj el la tri suboficioj de *Ojasima-Hiko* gardis tiutempe po unu perlo. Ili estis gardantaj ĉirkaŭ la lito de sia mastro. La fajro sin etendis pli kaj pli intense kaj la domo jam estis preskaŭ forbrulanta. Tiam la perlo de *Masumi* okazigis grandan ventegon kaj la perlo de *Siomicu* siaflanke okazigis alfluon de akvo. La fajro estis forblovita kaj estingita pere de la du perloj. Sed nun la perlo *Siohiru* ekblovis fajron. Helpata de la vento de *Masumi*, ĝi atakis la kastelon de l'Edeno. Vidante tion ĉi, *Takekuma* kaj liaj subuloj ekkuregis per la tuta forto. Ili travadis la riveron *Jordano* kaj malaperis en la Nordo. Sed multaj el liaj subuloj dronis en la rivero, kaj pereigis.

mangajoj dismaĉitaj de li mem. Sed tamen, tia mangajoj, mikstia kun homa salivo, okazigas venenon por sovaĝaj bestoj kaj foje tio eĉ mortigas ilin.

Ni estu idealistoj

Multaj samideanoj plendas pri tio, ke nia movado ne progresas sufiĉe rapide. « Esperanto stagnas, ili diras; post 40 jara fervora laboro, ni nombras apenaŭ 200.000 adeptojn. Kion signifas tiu malgranda nombro kompare kun la mil milionoj da teranoj? » Kaj tiam ili kulpigas nian ĝisnunan organizaĵon; ili postulas novan Asocion, centran Direkcion, internacian Parlamenton, Diktatorecon, k. t. p.

Niaj kontraŭuloj ankaŭ same asertas, ke ni ne kontentige progresas, sed pro alia kaŭzo. « Ne mirinde, ili diras; Esperanto estas tro malperfekta, tro barbara. Neniam la mondo adoptos vian lingvon tia, kia ĝi estas; ĝi bezonas modifigojn. Prenu do jen mian *Idon*, jen mian *Nov-Esperanton*, jen mian *Latinson sine flexione*, jen mian *Occidental*, jen mian *Novial*, k. c.; vi vidos, ke la mondo tuj alkuros entuziasme kaj ke nia afero sagrapide antaŭeniros. » Sed la mondo ne alkuras: ĝi mokridas aŭ restas indifera.

Kelkiuj ankoraŭ nun imagas naive, ke sole ia anaro de famaj lingvistoj kapablus elekti aŭ krei la plej bonan lingvon internacian. Kia iluzio! La ekzemplo de l'Idistoj klare evidencigis, ke lingvistoj neniam interkonsentas; tia Areopago de filologoj, supozante eĉ, ke ĝi estus starigebla, implikis ankoraŭ pli la demandon kaj naskus novan skismon.

Ne, por ni, Esperantistoj, la problemoj estas solvita, tre bone solvita, kaj ni progresos nure kaj sole per nia disciplino kaj per nia konstanta, fervora laboro. Cetere, kiam ni parolas pri progresado, ni devas bone difini, kion ni komprenas per tiu vorto. La lingvo mem evoluas kaj progresas por kontinua uzado; sed ni ne pretendas verbi finfine la tutan mondon. Tiela pretendo estus rindinda. Oni pensu nur al la multego da homoj, laboristoj aŭ vilaĝanoj, kiuj ne vojaĝas eksterlanden kaj kiuj ne korespondas aŭ rilatas kun alilandanoj; por ili la gepatra lingvo sufiĉas; ili ne bezonas ian ajn lingvon internacian.

Ili ankaŭ eraras, tiuj tro fervoraj samideanoj, kiuj nepre volas, ke jam nun, tuje oni lernigu Esperanton en lernejoj. Pro Dio! Kie ni trovas la necesajn instruistojn? la sinjoroj Ĉe ne svarmas en Esperantujo. Krom tio nia literaturo, kvankam jam ŝatinda, ne estas ankoraŭ sufiĉe riĉa por nutri intelekto la lernantaron.

Oni kontraŭdiros: kion do ni faru? Nu jen, ni devas ankoraŭ pacience klopedi, obstine propagandi kaj precipe ĉiam plu verki kaj labori. Ne gravas, se tiam monuloj ofende jetas al ni la moknomon de revuloj aŭ idealistoj. Ja jes, ni estas revuloj; ni *Esperantias*, kiel birdo kantas, kiel poeto versas; jes, ni estas idealistoj, kiel la fama germana verkisto Lessing, kiu pli ŝatis la esploron pri la vero, ol la veron mem. Nu, ni ankaŭ pli ŝatas nian ĵus naskitan, vartotan, kulturotan Esperanton, ol ian tutpretan lingvon, vivantan aŭ vivintan. Ni tiam konscias, ke ni estas kreantoj kaj ni sentas profundan, puran ĝuon.

Kompreneble ni ne plendas, tute male, se baldaŭ homoj, pli praktikaj ol ni, profitos el nia verko. Tion jam faras nun tiuj asocioj, kiel nia *Oomoto*, kiel *I. K. U. E.*, *S. A. T.* kaj aliaj, kiuj uzas nian lingvon por diskonigi sian propran idealon. Por ili Esperanto jam ne estas nura celo, sed precipe rimedo; kaj ju pli fleksebla, ju pli taŭga fariĝos la ilo, des pli efike ili ĝin utiligos por sia propagando. Nian verkon ili ne kontraŭas, ili ĝin kompletigas; ilia agado kvazaŭ kronas la nian. Vivu la idealistoj!

H. BOUCON.


SONĜO DE SONĜO

HIDEMARU DEGUĈI

II

Ĉio estis griza ĉirkaŭe. Mi estis okupita de iu nevenkebla sento, ke ĉiuj estajoj ĉirkaŭ mi, ekz., arboj, ŝtonoj, akvo ktp. volas min minaci kaj timigi. Finfine mi ekhavis timon de mi mem. Malgraŭ mia granda peno kontraŭ ĉi tiu malagrabra iluzio, la sento de timo kaj soleco min atakadis kun uragana potenco. La haŭto de miaj propraj manoj, jetitaj surtere, kiel la hundo faras, ĉial ŝajnis al mi skvamoj de serpento.

Ekaŭdiĝis de ie voĉo, kiu krias: Preĝu!



OXFORD, Anglujo
la urbo de la XXII-a Univers. Kongreso de Esperanto (2-11 aŭg. 1930)

Vere, momente mi ekrimarkis, ke ne estas alia rimedo ol preĝi, ĉn tia situacio, kaj penis koncentri mian penson al Dio. Sed ve, en mia kapo levigadis amaso da nuboj, kiuj malhelpis min pensi pri Dio. Kiom da peno mi vere uzis, dezirante reciti almenaŭ la plej mallongan preĝvorton aŭ eĉ nur Kannagara-Tamaĉihaemase. Estis tamen vane; mi ne povis eldiri eĉ unu sonon el la buŝo. Nun, mi penis kolekti mian tutan koron al la plaŭdo de akvo, kiu fluis apud mi; kaj mi, en tiu ĉi momento, observis la akvosonon kiel Dion. Iom post iom, ŝajnis al mi, iu nepriskribebla forto, kvankam tre modesta, provizigis en la profundo de mia ventro. Mi restis en tiu ĉi stato por longa tempo. Hazarde al mi venis ideo, ke mi gravuru sur la apuda roko unu literon de « Dio » (1), kiom eble grandan kaj belan. Mi do ekprenis fortan ŝtonon de meza grandeco por gravurilo. Sed ĉar mi pensis, ke estas por tio unue necese konstrui Dian templon por apoteuzi Dion, mi decidis plani unue por tio. Mia projekto estis konstrui sur alia plata roko masonitajn turetojn en la imago de Dia templo, entute tri. La meza estu dediĉita por la Granda Dio kaj la aliaj du por la du Dioj akompanantaj (2). Tiu ĉi afero vere similas al infanaĵo, sed tamen, mia tiama sentimento aŭ sintenado estis treege serioza. Mi kredas, ke, eĉ se la laboroj estus tre malgrandaj kaj trivialaj, se la penso de la laboranto estus serioza kaj sincera, tio certe komunikus al Dio.

Nu, mi spirblovis la surfacon de la plata roko kaj metis sur ĝi ŝtonetojn en formo de oblonga kvadrato por limi la teritorion. Due, mi lavis zorgeme la ŝtonojn, per kiuj mi konstruos la templojn, en la vala rivereto. Kaj poste mi eklaboris, komencante de la

(1) Laŭ ĥina skribo, kiun japanoj uzas, la litero de « Dio » estas unullitera.

(2) Pragepato de Pozitiveco kaj Negativeco, laŭ japana genezo.

meza. Ŝajnas, ke tia afero estas tre simpla kaj facila, nur meti la ŝtonojn unu sur la alia kaj tiel formi turon; tamen, tio ne estas tiel facila, kiam oni sin tenas en serioza korstato. Bezoniĝas sufiĉe grandaj zorgoj kaj peno ĝis kontentigo.

Laborante tiamaniere super la templokonstruado, mi akiris en la animo plurajn instruojn unu post alia:

Unue, ke la homo ne povus saĝigi, se li ne farus iun ajn laboron.

Due, ke ĉio, kion la homo faras kun forta decido en la koro nepre fariĝas lia propra posedajo.

Trie, ke tiel estas objekto, kiel estas subjekto; nome, ke la interna mondo kaj la ekstera mondo de la homo estas koincinda. Kiam la koro ĝojas, tiam ĉio ekstera estas agrabra, kaj inverse...

Kiam mi venis ĝis ĉi tie en la pensado, min trafis momente alia ideo. Tio estas: la ekstero estas kreata per la interno, kaj samtempe la interno estas influata de la unua... Estas evidenta fakto, ke kiam oni rigardas belajn florojn, oni ekhavas nature mildan kaj elegantan emocijon; se oni kunestus kun amata persono, la koro ial gajigus; se la homo loĝus en granda domo, lia koro ankaŭ fariĝus iam kaj iam grandeca kaj vasteca ktp., ktp. Do, la cirkonstanco estas tre grava por kreskigi kaj evolui la kvaliton de la homa animo. Dio donas la cirkonstancojn kaj la cirkonstanco faras la homon, tiel oni povas diri. Tial, estas esperinde, ke mi havu ĉirkaŭ mi kiom eble abunde pli da tiaj aferoj, kiuj esprimas veron, bonon kaj belon. Estis ja la sono de valakvo, per kiu mi kaptis Dion tie ĉi en la konfuzita stato. Kaj, kiom da konsolo kaj forteco mi akiris en mia animo per la konstruo de tiuj ĉi tri turoj, kiel la temploj de Dio, kiu por eterne liveras al mi la favoran gardon kun grandaj prospero kaj trankvileco; kaj ankaŭ per la admiro de la temploj aŭ preĝi antaŭ ili. Kiom da inspiro mi povos kreskigi en mi per gravurado de bela litero de « Dio » sur la roko kaj per konstanta rigardado al ĝi! Jes, certe, samtempe la koro kreas la aferojn kaj ĝi ricevas gravan influon de la faritaj aferoj. Alivorte dirite, la koro estas subtenata de objektoj kaj per ili estas trankvila. Objektoj estas vestaĵo aŭ domo de la koro. Tial oni devas teni ĉiam puran koron kaj fari aŭ naski vere belajn kaj bonajn aferojn ĉirkaŭ si. Se homoj kreus malbelajn aferojn per maljasta kaj malnobla koro, la faritaĵoj nepre turmentus la kreantojn kiel malbonajn vivaĵoj; ili turmentas ne nur la kreantojn, sed ankaŭ la apudstantojn, kiuj sentas kaj rimarkas la malbelecon kaj la maljustecon, per la forto korespondanta al la grado de la observantajo. (Homoj, kiuj ne posedas en la koro maljustecon aŭ malbonecon, ne sentas la eksteran malbonecon.)

Fari laboron per malbela kaj malnobla koro, tio egalas disŝuti malpuraĵojn ĉirkaŭ si; kaj labori kun pura kaj nobla koro, egalas etendi ĉirkaŭe belan florgardenon. Resume, la homoj ĉiumomente sin juĝadas per si mem. Tio estas la neevitebla, natura rezono. Tio estas la leĝo de Dio.

Oni povus sin trompi kelkfoje kaj observi la malpuraĵojn kiel florojn, kaj ankaŭ povus ilin eviti iamaniere por certa tempo, sed tamen, kiel tio utilis finfine? Malpuraĵo restas malpuraĵo en fakto! Kiom da suferoj la plej multaj homoj vere travivas baldaŭ post sia morto, dank al la vizioj de pektoj, kiuj ombris ilian animon dum la tera vivo?!

(Dairigota).

FILMARTO

Estas rimarkinde, ke dum la lasta jaro 1929, la arta kvalito de la silentaj filmoj superis konkoste-tiun de la parolfilmo. Tio estas, nature, komprenebla afero, ĉar la silenta filmo akiris, dum multjara ekzisto, spertojn, kiuj ĝin kondukis al pli kaj pli da perfekteĝo. La parolfilmo ĵus naskiĝis. Ĝi ne havas spertojn kaj grandan historion. Tial, ni devis kaj eble ankoraŭ devos kontentiĝi nur per rigardo de mezbonkvalitaj filmoj, al kiuj oni aldonaĵojn kaj parolojn, adaptitajn pli malpli lerte (ofte fuŝe) al la temo de la filmo, kiu, cetero, estas reeladono de jam viditaĵo. Mallonge, en la filmo nenio nova. Tute ne volante esti pesimistoj, ni antaŭdiras al la parolfilmo ankoraŭ longtempem barakadon ĝis ĝi trovos la ĝustan vojon por akiri la famon de la silenta filmo. Kaj kion diri pri la lingvo ? ! Eble vin intereso la fakto, ke la filmproduktistoj neniel zorgas pri ĝia komprenebleco de ĉiuj gentoj de la mondo. Tiel, la usonanoj produktas parolfilmojn en usona lingvo (kaj kia kuraĝo ! en Usono mem usonlingvaj geartistoj estas devigitaj ludi eĉ en franclingva parolfilmo kaj ĝin la produktistoj deklaras internacia); la angloj — en angla lingvo; la francoj — en franca lingvo kaj la germanoj — en germana lingvo. Ĉar ni devas perdi la kutimon esti surprizataj, kiam komencos aperi (kaj tio estos baldaŭ) parolfilmojn en hispana, itala, rusa, japana, ĉeĥa, pola, sveda ktp. lingvoj, ni senemocie restu trankvilaj — almenaŭ la aĥŝoj sciigos nin kialingva parolfilmo ĝi estas.

Tiom malpli bone por la deklingsvokanton, al kies sciencaj oreloj oni proponas bonegan parolfilmon en rusa lingvo, kiun lingvon ĝuste li ne komprenas.

V. M. ŜIŠKOV.

BIBLIOGRAFIO

Pri la *Domo de Homamo* publikigis artikolojn la jenaj ĵurnaloj: *L'Amitié Française* kaj *La Revue Spirite* (franclingvaj), *Informe de Esperanto-Asocio de Estonio kaj Aŭstria Esperantisto*. Ĉiuj Esperanto-ĵurnaloj estas petataj publikigi malgrandajn artikolojn pri la konstruo de la *Domo de Homamo*, kiun *Oomoto Internacia* entreprenas. Pro tio ni estos tre dankemaj al ili. Ĉu estas necese diri, ke la *Domo de Homamo* devas esti verko de ĉiuj esperantistoj kaj tial, ĉiu havu la taskon helpi iel ajn la entreprenon ? ! Disvastigi do tiun grandiozan ideon, kiel eble plej multe, sendu senprokraste viajn brikojn !

Belga Antologio, Flandra Parto, kompilita kaj kun literatura resumo de H. Vermuyten. Eldonita okaze de la 20-a Universala Kongreso de Esperanto de la Belga Esperanto-Instituto, 11, Kl. Hondstr., Antverpeno, Belgio. Preskaŭ 290 paĝa, prezo nemontrita.

La *Belga Antologio, Flandra Parto* estas respondo al la Belga Antologio, Franca Parto. La kompilinto kun siaj kunlaborintoj plenumis facilan taskon kaj agrablan devon, ĉar la libro estas bone kaj zorge aranĝita. Ĉi instruas nin, ke la flandra lingvo estas parolata en la mondo de proksimume 12 milionoj da homoj, el kiuj 4 milionoj estas flandroj. La historio de la flandra lingvo, la antologio parto kun tradukoj el multaj flandraj aŭtoroj disponigas al ni sciojn, kiujn ni malfacile trovas aliloke.

Niaj belgaj samideanoj montris imitindan ekzemplon. Ni tre esperas, ke la laboremaj anglaj samideanoj, okaze de la 22-a Universala Kongreso de Esperanto en Oxford, sekvos ĝin, montrante al la esperantistaro la riĉecon de sia literaturo en konciza formo. Angla antologio en Esperanto ja estas dezirinda afero, nia opinio.

Esperanto (Genevo), *Heroldo de Esperanto*, *Germana Esperantisto*, *Hina Telegrafisto*, *Aŭstria Esperantisto*, *Fluganta Skribilo*, *Flandra Esperantisto*, *Belga Esperantisto*, *La Movado*, *Hinda Esperantisto*, *La Revuo Orienta*, *Sennaciulo*, *Pola Esperantisto*, *Espero Katalika*, *Verda Mondo*, *Oomoto*, *The International Language*, *The British Esperantist*, *Arbeiter-Esperantist*, *Marto*, *La Suda Kruco*, *Skolta Heroldo*, *Junulara Ligo de Nagasaki*, *Informoj de Esperanto-Asocio de*

Estonio, *Svenska Esperanto-Tidningen*, *Bulgara Esperantisto*, *Hispana Esperanto*, *La Juna Balalanto*, *Esperanto-Praktiko*, *Balkana Esperantisto*, *La Progreso*, *La Vojo de Klerigo*, *Antaŭen*.

L'Amitié Française, *La Revue Spirite*, *L'Ère Spirite*, *Fraternité*, *Das Wort*, *Der Freidenker*, *Vegetarische Presse*, *L'Aube Nouvelle*, *Unity*, *The Rosicrucian Magazine*, *Oleaya*, *La Luz del Porvenir*, *Naj-Novo Vreme*, *Villeemska Zvezda*.

Domo de Homamo

La Domo de Homamo ricevis de :

S-ro Josef Major, Paris, Francujo	fr. fr.	20.—
S-ro Auguste Ricord, Toulon, Franc.	fr. fr.	10.—
S-ro Aimé Sandelyon, Lyon, Franc.		
(dua fojo)	fr. fr.	10.—
S-ro Marcel Tiard, Paris, Francujo	fr. fr.	20.—
S-ro Jans Groenveld, Bergum, Holland	fr. fr.	5.—
S-ro Ant. Veverka, Mukaĉevo, Ĉe oslovakujo	fr. fr.	5.—
S-ro N. Warhaftig, Augustów, Pol. fr. fr.		35.—
S-ro Giovanni della Savia, Udine, Italujo	fr. fr.	4.—
S-ro J. Ravastein Jr. kaj edzino, Ilago, Holland	fr. fr.	50.—
« Nemo », Flensburg, Germanujo	fr. fr.	60.—
F-ino Irene Molinari, Locarno, Svis.	fr. fr.	4.—
S-ro J. E. Bauman, Lincoln, Usono.	fr. fr.	10.—
Kvara listo	fr. fr.	4.358.—
Entute	fr. fr.	4.591.—

Kore dankas

Oomoto Internacia.

Kian ajn sumon ni akceptas kun plej granda danko. Bonvolu sendi viajn brikojn al S-ro Nišimura, 124, rue de la Pompe, Paris-16^e.

La nomojn de la donacintoj ni publikigos en *Oomoto Internacia*.

LETERKESTO

Ni ricevis la abonkotojn de la jenaj Gesamideanoj: S-inoj Marcelle Tiard, Paris, Francujo; Jans Groenveld, Bergum, Holland; F-inoj Else Trundt, Interboth b. Berlin, Germanujo kaj Irene Molinari, Locarno, Svisujo; S-roj J. Illa, Letovice, Ĉeĥoslovakujo; H. Nischwitz, Mannheim, Germanujo; Aimé Sandelyon, Lyon, Francujo; Esperantista Societo « Nova Sento », Barcelona, Hispanujo; Vicente Mariu, Barcelona, Hispanujo; Ant. Veverka, Mukaĉevo, Ĉeĥoslovakujo; Jean Zöchling, Bregenz, Aŭstrujo; Abram Gelfand, Grajewo, Polujo; N. Warhaftig, Augustów, Polujo; K. Cyponka, Vredem, Germanujo; Ildo Bosi, Corregio, Italujo; S. Ciperia, Linz a. D., Aŭstrujo; Wilh. Pikartz, Buer Hassel, German.; Rud. J. Schaur, Eisenz, Aŭstrujo; G. P. Ferree, Chelsea, Usono; W. Ehms, Marienverder, German., kaj John E. Bauman, Lincoln, Usono.

Al ĉiuj — koran dankon !

La abonkotoj estas pagebila plej facile per internacia poŝtmandato, internaciaj respondkuponoj aŭ *per nacia mono*, sendita rekomendite.

Ni direktas specialan dankon al ĉiuj gesamideanoj, kiuj regule pagis sian abonkotojn depost la fondo de nia ĵurnalo en 1926. Kelkaj el ili farigis fervoraj propagandistoj de U. H. A. kaj havigis al ni ĝis nun estimindan nombron da abonantoj. Ni esperas, ke ĉiuj niaj amikoj varbos por *Oomoto Internacia* almenaŭ po unu abonanto. Ni ĝojas sciigi la tiomdandan legataron de « O. I. », ke, dum 1929, plej multe da abonintoj liveris Ĉeĥoslovakujo. Sekvas poste Germanujo, Bulgarujo, Francujo, Anglujo ktp.

*

Ni akceptas abonkotojn ĉiutempe dum la jaro.

Skribu klare kaj legeble vian adreson sur ĉiu korespondajo. Ni ne povas memori parkere proksimume 5.000 adresojn. La adreso ne devas esti nur sur la koverto, sed ankaŭ sur la letero mem kaj precipe, ni ripetas, ĝi estu klare legebla.

Al la verkemuloj de artikoloj, sciigoj ktp por « O. I. » ni rekomendas klaran skribmanieron kaj nur sur unu flanko de la folio, kun sufiĉe granda margino por eventualaj korektoj. La artikoloj estu preferinde originalaj kaj ilia enhavo devas pareniciĝi kun la celoj de U. H. A. rekte aŭ malrekte. Kompreneble, ni ankaŭ akceptas altemajn artikolojn, kiuj estas vere interesaj kaj publikigindaj. Manuskriptojn ni sendas, nur kiam oni disponigas al ni la necesan afrankon. Retenu por vi kopion !

*

Multaj amikoj kaj samideanoj bonvolis saluti nin per leteroj kaj kartoj, okaze de la nova 1930 jaro. Ni ilin kore dankas !



NIA LITERATURO

Ni atentigas niajn legantojn pri nia literaturo, havebla en nia oficejo :

Kio estas Oomoto? eldono de Oomoto-Oficejo, Kameoka	Prezo: Sv. Fr.	0.60
Konturo de Oomoto, sama eldono		0.20
Origino de Oomoto, — Sankta Vivo de S-ino Nao Deguĉi, eldono de UHA-Oficejo, Paris		0.25
Klarigo de Kamigakari, sama eldono		0.40
Fundamento de Animo		0.30
What is Oomoto? (anglalingva), sama eldono		0.40
Oomoto (germanlingva), eldono de Neugeist, en Pfullingen, Germanujo		0.50
Oomoto, monata organo de Oomoto-Propaganda Oficejo, Kameoka. Jarabono		4.80
Sinjoro Landata, eldono de Oomoto-Oficejo, Kameoka		1.50
Das Reich Gottes auf der Erde, eldono Rud. Burkert, Niemes, Ĉeĥoslovakujo		0.75
Verda Mondo, monata organo de Esperanto-Propaganda Asocio, Kameoka. Jarabono		3.—
Oomoto Internacia, monata organo de Universala Homama Asocio, Paris. Jarabono		3.—

Rimarko: Ni akceptas abonkotojn por nia ĵurnalo « Oomoto Internacia » ĉiutempe dum la jaro.

Mono, poŝtmandato aŭ rekomenditaj leteroj devas esti sendataj al la persona nomo de la ĉefredaktoro, S-ro Koogecu Nišimura, 124, rue de la Pompe, Paris (16^e).

Das Reich Gottes auf der Erde

Mallonga germanlingva historio de Oomoto. Bona propagandilo por esperanto.

4 bildoj — 32-paĝa

Prezo: 4 k. c. aŭ 60 pf. (eksterlando).

HAVEBLA ĈE :

Johannes-Baum-Verlag (Weisse Fahne)

in Pfullingen, Württemberg.
J. Kahler, Glockenverlag, in Freiheit i. Riesengebirge
Tchechoslovakaj.

Buchhandlung Andreas Pichl,

in Wien, linke Wollzeile 8.

Rudolf Burkert, in Niemes, Böhmen.

BELASPEKTO RIĈENHAVO

ORIGINALLECO

estas la kvalitoj de la
luksa ŝtofkovrila libro

SINJORO LAŬDATA

Ĝia modesta prezo (nur sv. fr. 1,50) provas, ke ĝin povas aĉeti ĉiu esperantisto.

108-paĝa

sur tre bela papero
Esperante kaj japane

Mendu ĝin ĉe

S-ro K. NIŠIMURA

124, Rue de la Pompe, PARIS-XVI^e

Heroldo de Esperanto

SEMAJNA — SENDEPENDA
GRANDFORMATATA — ILUSTRITA

La vera spulglo de la tutmonda Esperanto-movado. Unu el la nepre regule aperantaj Esperanto-gazetoj. Festas en la nuna jaro sian dekjaran jubileon.

Petu senpagan specimenon, samtempe kun nova Katalogo de Libro, de la Administracio de

● **HEROLDO DE ESPERANTO - Kòin Germanlando** ●
Brüsseler Str. 94

Le Gérant: HENRI SELVES

Oomoto-Presejo Esperantista (V. Polgar), 31, rue Lacépède, Paris, 16^e